## LANGOROMPILOJ ORIGINALAJ



Aperis apro sur areo de arkeo.


Basta bastono batas bone.

Beto ne estas besto; ne el betono estas beto

Citrono, cepo kaj celero acidaj spicoj estas. Colo post colo licas parcelon pecetigi.

Ĉevalo ĉaron tiras ĉirkaŭ ĉerizejo.

Dama domo en densa odoro dronas.



Ermita erinaco enuas pro manko de erotiko.

Freneza faraono fuŝis formon de flakono.

Generalo generas genepojn; gazelo legas gazetojn.

Ĝemu: ja ĝardeno iĝis ĝangalo!

Herkula gasto hastas al hedera heĝo.

Ĥana ĥoro en ĥalatoj kantas. Ĥimera hundo hantas.

Indico de indiĝeno iĝis impona imagipovo.

Jasmen' jubilas en junio! En jonosfero jelpas jeto!

Ĵetonon ĵaŭde ĵetis ĵazbandist' ĵaluza!



Kara kajero kaj akra krajono kuŝas en kelo kamera.

Longan lornon lasu en lombardo.

Muson mergas en mornan maron mava mevo!

Nek nebulo, nek neĝo nigrulon blankigos. Nova novelo – sur nula nivelo!

Ordeno el oro ornamis orelon de nia gvidoro.

Poŭpa parto de vapora pramo pretas!

Selektu spatelon por sarki sekalon. Spirito spiras spite al suspendo.

**Ŝ**ikaj ŝtrumpoj ŝimas en ŝranko. **Ŝ**arkoj ŝmace baŭmas en ŝaŭmo dum ŝtormo.

**T**edis la tondro; por tenera tono ni tostu! **T**urka tramo trafis trotantan trompiston.

**U**rso urĝe kuris de l' urtiko.

Almen*aŭ* la laŭran laŭbon laŭdu laŭte

**V**ertago kun vertrago ne vetu!

**Z**izelo al zizelo zumis pri zibelo.



* * * * * * * *

Ĉu ŝi ĉiam pro ĉio ruĝiĝas?

Roza zorge flegas flavajn florojn.

Punta tuko de Ruta putras sur fundo puta.

Alta alko al alna aleo galopas.

Pretas la breto por edro de katedro.



Ŝi ŝiris ŝoson de ĉeŝosea arbo.

Hundo trovas fungojn sur fundo de humida furgono.

La haladzo trafis edzon, kaj al li ĝi kaŭzis lezon.

Lerta lernanto al latina libro okulumas.

Ŝi ĉesis serĉi ĉefŝakiston. (ĉifitan meĉon)

Kulero da klara liriko klerigos eĉ klerikon.

Sub signo de cigno cizelu silikvon.

La lasta gasto hastas al ĥaoso.

Vere bela bevelo borderas la verdan botelon.

En okcidento okazis akcidento.

Ĉu ĉiuj ses venis kaj svenis?

Vila bizono al vigla bovino belan violon donis.

